



# PENSEO

*N-ro 214*

*aŭg. / 2009*

Monata Beletra Revueto en Esperanto  
Honorita de Premio Grabowski, 1994

Fondita en 1990; Enretigita en 1997 la 20-a jaro <http://www.elperno.cn/penseo/penlisto.htm>

## Neantaŭvidita Rezulto

### Senoma

La jena historieto okazis somere en la jaro 2200.

Tiun tagon, kiam li retratis pesionon ĉe la banko, li vidis la reklamon en la montrofenestro ĉe la pordo de la banko, kiu legiĝis “Meiji Sanprotekta Centro freŝdate sukcesis ellabori terapion de rejunigo pere de medicina plibeligo. Post la terapio, maljunuloj povas rejuniĝi. Ne maltrafu la oran ŝancon!” Kaj sub la reklamo montriĝis grandformata kolora foto, en kiu troviĝis vigla junulo farĝinta al maljunulo post plibeligo.

Tio vibrigis lian koron kaj lia sango ŝprucis supren al lia kapo. Rejuniĝo! Kian sonĝon oni volus realigi dum multaj jaroj!

Reveninte hejmen, li rakontis al sia maljuna kunulino pri la terapio dum vespermanĝado. Aŭdinte tion, ŝi ankaŭ ekinteresiĝis pri tio, dirante, “Do, ni iru ricevi la terapion. Kiel bone, se ni rejuniĝos!”

“Sed,” li diris embarasite, “nia ŝparmono sufiĉas nur por unu el ni ambaŭ...”

La kunulino eksilentis. Tio vere estas malfacila problemo. Kiu el ni rajtas ricevi la terapion?

Nokte prezentiĝis surloka rekta dissendo de futbala matĉo en televida programo. Kiam du teamoj elektis la terenduonon, la juĝisto decidis tion pere de ĵetado de monero. Ekpensinte, li diris al ŝi, “Ni decidu per la metodo de ĵetado de monero. La frontflanko de la monero estas mia vico por ricevi la

terapion kaj la dorsflanko via vico, ĉu bone?” Ŝi kapjesis.

Elpoŝiginte moneron, li ĵetis ĝin en aeron. Kiam ĝi falis surteren, li piedpremis ĝin. La rigardoj de ambaŭ fikse restis sur la piedo, sub kie kuŝis la monero. Post kiam li malrapide demovis sian piedon de la monero, videblis ĝia dorsflanko.

Tiunokte ili tiel ekscitiĝis, ke ili ne povis fermi siajn okulojn por dormi. Kiel ekscitige rememori pri romantikeco dum junaj jaroj!

La sekvan tagon, li akompanis ŝin al plibeligejo. Alia maljunulo kun blankaj haroj eniris la terapiejon samtempe kune kun ŝi.

Ekstere li atendis sidante, sentante, ke la tempo longe treniĝas.

Post longa tempo, la prod de terapiejo malfermiĝis kaj aŭdiĝis arĝentsona ridado. Tio estas ŝia ridado dum junaĝo! Elvenis ŝi, vigla kaj bela! Por pli ĝuste diri, elvenis la fraŭlino, kiun li siatempe pene ĉasis! Liaj kruroj tremadis pro ekscititeco. Ĝuste kiam li alpaŝis al ŝi, okazis neatendita afero. Junulo kuratingis ŝin de malantaŭe, kaj ili, brako en brako, preterpasis lin, ridante kaj interparolante.



Ŝi eĉ ne konis lin!

La dorsfiguro de tiu junulo memorigis pri la maljunulo, kiu eniris la operaciejon samtempe kune kun ŝi.

Li eksentis atakon de kapturon.

Kiam li remalfermis siajn okulojn, troviĝis neniuj antaŭ liaj okuloj. Turninte la kapon kaj vidinte la reklamon sur la muro, li indigne sin alĵetis por deŝiri ĝin. Tiam en lian vidkampon prezentiĝis linio da malgrandaj vortoj, kiuj legiĝis: “Averto Meiji Centro: Post rejuniĝo, kelkaj eble perdos rememorkapablon pri pasintaĵoj.”

elĉinigi **Hongjia**

## Ĉineske

### Guozhu

## Plena Sun-eklipso

—laŭ ĉinesko Yongyuyue\*

**Por publiko  
Surprizĝoja  
sensacio,  
en du-mil naŭ,  
festeno de  
astronomio.  
Sun-eklipso  
plena kaj en  
larĝa dimensio  
okazas  
du-dek duan,  
ĉe ni en julio.**

**Televideo  
disvidigas  
rekte el Ĉinio.  
Imponas la  
fenomeno  
kvazaŭ magio.  
Ses minutoj  
da noktiĝa  
tagiĝa vario.  
Eterne  
memoranda  
emocio**

\* ĉina fiksfirma poemo el du strofoj po 12 versoj de 444, 445, 446, 346 / 446, 445, 446, 344 silaboj, laŭ rimaranĝo xxa, xxa, xxa, xxa (x=senrima)

### Vejdo

## Suneklipso

—laŭ ĉinesko Tiaoxiaoling\*

**luno  
luno  
alnaĝas al suno  
ĝin ŝirmas konkere  
mallumigas vere  
reve  
reve  
sun' tuj brilas kreve**

\* ĉina fiksfirma poemo el ses versoj de 4, 6; 6, 6; 4, 6 silaboj, laŭ rimaranĝo de aa,bb,cc. La 4-silabaj versoj konsistas el du ripetaj vortoj. Kaj la unua vorto de la kvina verso devas esti el palindrome ordigitaj silaboj de la lasta vorto de la kvara verso. ekz. rimi-miri; mora-arom; nomo-mono; roso-soro.



### Mandio

## Spektado al Suneklipso

—laŭ ĉinesko Huanxisha\*  
**plene taglumas jam nun  
ekvanuas part' de l' sun'  
pro kovrado de la lun'**

**mallum' tuj pendas base  
vualiĝas ĉi' en brun'  
ĉu malfeliĉ' aŭ fortun'?**

\* ĉina fiksfirma poemo el du strofoj po tri versoj de sep silaboj laŭ rimaranĝo aaa / xaa (x=senrima)

## Cindy Mckee (Usono)

# Neda

—laŭ ĉinesko Pozhenzi\*\*

**Persio regata  
de menso obseda  
Kantas antikvaj voĉoj  
pri kulturo hereda-  
aldonu Neda**

**Spirita gvidanto  
spirito poseda  
Kantas juna spirito  
leviĝas voĉo pleda  
memoru Neda**

*\*Neda estis junulino kiu partoprenis en paca manifestacio kontraŭ la forpreno de voĉdonrajto en Irano. Kuglo de kaŝpafinto forprenis la vivon de Neda. Ŝia nomo signifas voĉo en la persa (farsi) lingvo.*

*\*\* ĉina fikforma poemo el du strofoj po 5 versoj de 66,77,5 silaboj, laŭ rimaranĝo xa,xa,a (x = senrima)*

## La temo estas limonado

—laŭ ĉinesko Jianzi Mulanhua\*

**porda puŝo  
tiam tenera tuŝo  
buŝa suĉo  
ĉerpo el suka kruĉo**

**lekas lango  
globajn gutojn de vango  
gluta glito  
likva kisoekscito**

*\* ĉina fikforma poemo el du strofoj po 4 versoj de 4,7; 4,7 silaboj kun para rimo.*

## Poezio Forvaĝis

(kromnomo: **stulta poemo**)

—laŭ ĉinesko Siyuanren\*

**Sidas mi proksime, for  
pensojn mi levas  
ekster korpo  
ili vagas  
kien mi revas**

**Riproĉojn mi ricevas  
denove devas  
reveni domen  
survizaĝe  
rideto krevas**

*\* ĉina fikforma poemo el du strofoj po kvin versoj de 75, 445 / 7,5,545 silaboj respektive, laŭ rimaranĝo xa,xxa / a, a, xxa (x=senrima)*

## Ekzisto pro bezono

—laŭ ĉinesko Queqiaoxian\*

**Ĉu ekzistas  
senarbitra  
vero absoluta-  
aksiomo de ĉio  
solida  
senrefuta?**

**Ĉu bezono  
havi bazon  
estas atributa  
vero de kerna vero-  
esenco  
neimputa?**

*\* ĉina fikforma poemo el du strofoj po 6 versoj de 446, 734 silaboj, laŭ rimaranĝo xxa,xxa (x=senrima)*

## Yanke

## Trompita Amo

—laŭ ĉinesko Chaitoufeng\*

**kelkjara  
erara  
am' nin tenas senpara  
kun glaci'  
sen ĝojkri'**

